1974_ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _"Aktuale"-1_ _ _ _ _ _ _ _ _ _januaro_ _ _ _
Monata informilo de Sovetlanda Esperantista Movado

## Pri unu speco de patriotismo.

Kluba jarkunveno."Kandidato" al estrara posteno saltostaras kaj protestas:"mi ne kapablas gvidi".Mi ne konsentas principe, ja pli-malpli bone gvidi povas ĉiu,kiu deziras gvidi ~~mi~~ kaj scias aŭ sentas regulojn de gvidlaboro.En niaj E-organizaĵoj ne estas loko por karierismo.Kio,do,instigu la deziron gvidi?Patriotismo.

Vi,verŝajne,jam rimarkis,ke multaj aktivuloj havas po kelkajn seriozajn taskojn,kiujn ili plenumas,sed kial po kelkajn?Ja bone plenumi unu estas pli facile!Tiel okazas,ĉar iuj nenion faras, flosas laŭtrente.Flosas kaj malbenas enuon de la vivo,mankas al ili patriotaj sentoj.

Pri kiu patriotismo temas?Temas pri dezirego,ke via grupo, via klubo,SEJM,Esperantujo bone fartu.Patrioto zorgas pri sia grupo.Li penas ke la grupo estu la plej aktiva,la plej devosenta, la plej amikeca,li estas oferema kaj postulas alies oferemon.Se iu "ekdormas"li faras ĉion por veki la dormulon.En bona grupo neniu estas indiferenta al komunaj celoj kaj persona farto de samgrupanoj.

Unu epizodo el la vivo.Grupgvidanto tute pasiviĝis,konata bildo,ĉu?Verŝajne okazis tiel:li alprenis tro multajn taskojn - ili lacigis lin.Malbenita indiferentemo de samgrupanoj pri lia laboro mortigis patriotecon de la gvidanto.Anstataŭ elekti unu pli gravan konstantan taskon kaj provi kunlaborigi la grupojn,li elektis la plej malbonan eliron:senaverte malaperi.

Neniu naskiĝas patrioto.Patriotojn oni edukpretigas.La unuaj tion devus kompreni kursgvidantoj.Bone scipovi Esperanton ne estas la plej ĉefa afero.Multe pli gravas sindonemo kaj iniciatemo,granda kompreno de la grandioza ideo,kiun prezentas Esperanto.Kompreneble,ĉiu vera aktivulo devas strebi al la lingvo~~xxxxxxxxx~~,kaj sperteco,kaj ankoraŭ.Tiujn,kiuj nur bone scipovas la lingvon,sed ne pli ,ni ne nomu "bona esperantisto".Palas Esperanto sen esperantismo,ĉe bona esperantisto ili vivas kune.

V.Ŝilas(Vilnius).

skribi al A.H. ✓ Libro pri E-movado en USSR proponatas

V.I.Lenin skribis,ke la ĉefa devo de veraj ĵurnalistoj estas priskribi la historion kurantan.Same tion faras esperantistoj, kiuj publikigas siajn pensojn en ĵurnaloj.Ĉe ni jam ekzistas interesa artikolaro,prilumanta la E-historion en nia lando.Tamen la ĵurnal~~xxx~~oj estas etemeraj:oni ilin legas kaj forĵetas,forĵetante tiel nian historion.Mi proponas jenon:kompili libron el la materialoj,jam aperintaj en la soveta preso.Havu ĝi tiujn partojn: 1.Vivo de eminentaj esperantistoj.2.Niaj tendaroj kaj enlandaj renkontiĝoj.3.Eksterlandaj vojaĝoj,kongresoj ktp.

Por tio - elektu ni redaktan komitaton,kiun mi gvidos kiel gazet-servo de SEJM(2-3 personoj sin proponu mem).Al A.Medinŝ kaj T.Bercis estas peto fari bibliografion de ĉiuj esperantaĵoj,aperintaj en Rigaj ĵurnaloj(la samon faru Ufa,Barnaul ~~kaj~~,Taŝkent kaj aliaj urboj.Havonte liston,ni faru arkivon de la publikaĵoj(multaj jam perdiĝis,do oni refotu ilin en bibliotekoj).La komitato redaktos elektaĵojn.Poste ni retajpos kaj multobligos libron.Ĝi estos bona propogandilo kaj memorigilo pri la E-historio,valora kaj por komencantoj kaj por primovada lernejo kaj por instancoj - por ĉiuj aŭtoritata,ĉar fondita sur la publikaĵoj en la soveta preso.Jam post ĝia apero ni povas ĝin esperantigi... se ne mankos entuziasmo.

Entuziastoj sin proponu,ne sinĝenu laŭ mia nova adreso:

117449,Moskvo V-449,a.k.325,Ĥarkovskij Aleksandr.

Movado_ne zorganta_scii pasinton_ne havos estonton.

Mi ne volas klarigi aŭ pruvi la titolon ĉi-supran.Ĝi estas kiel aksiomo.

De tago al tago,jen kaj jene la bulteno de I.I.Palkin alportas al ni dolorigajn sciigojn:mortis tiu aŭ alia veterano de E-Movado.Koro kunpremiĝas,ne multe ja restis ĉe ni E-veteranoj post tiom da jaroj malfacilaj por Esperanto.Mortas ili ne ĝisvidinte venkon de Esperanto en nia lando,transdoninte la verdan torĉon al ni.Tamen restas iliaj nomoj por ĉiam gravuritaj en la Historio de E-Movado.Sed ĉu nur nomoj?Jes,tio minacas.Junaj esperantistoj de SEJM:movado,zorganta scii sian pasinton havas estonton.

De kelkaj jaroj ni klopodas petante iujn E-veteranojn skribi siajn rememorojn pri la agado en 20-30 jaroj aŭ eĉ antaŭrevoluciaj jaroj.Nun ni povas diri,ke ĉi vojo estas nesukcesa.Verŝajne ekzistas aro da obstakloj,kiuj ne permesas al nia kara veterano preni plumon rememore.Sekve ni ne atendu,ni mem eklaboru ĉi-direkte.Rimedoj?Tute simplaj,plenumeblaj.Ni vizitu veteranojn kun plumo kaj skribu de ilia parolo rememorojn pri la pasinta E-agado.

Jam delonge staras en SEJM demando,fondi historian fakon. Sed ni bezonas antaŭ ĉio gvidanton;dume mankas fervorulo,kiu proponus sin(kaj ne laste havus kondiĉojn)por tiu laboro.Sed ni ne atendu.Mi proponas dume skribi rememorojn laŭ jena plano:

1)Ĝeneralan biografion de veterano,poste lian(ŝian)E-vivon--agadon;

2)Liajn(ŝiajn)rememorojn pri laxplej elstaraj(laŭ lia(ŝia)opinio)esperantistoj de la pasinto(dezirinde,laŭ eble multajn detalojn);

3)Liajn(ŝiajn)rememorojn pri E-eventoj komencante de klubaj kunvenoj kaj finante per E-kongresoj;

4)Ĉion ceteran iom ajn ligitan al Esperanto.

Tiun laboron necesas komenci tuj,hodiaŭ,morgaŭ.En Ĥarkov kaj Leningrad,Vilnius kaj Moskvo kaj ĉie.La rememorojn,ĝis ni ne havos histori-centron necesas konservi en la kluboj,ĉe la plej fidindaj esperantistoj.Kio rilatas teknikon de la skribado,eblas per magnetofono surbendigi la rememorojn kaj poste hejme reskribi mane.

Por akceli ĉi laboron,mi metos por voĉdono inter la estraranoj demandon,poentigi(speciale alte)skribadon de la rememoroj.Ek al la plumo,geamikoj!

A.Gonĉarov.

Pri progresantoj.

Sur paĝo 21 de "Aktuale"-3 s-ano A.Gonĉarov tuŝis tre gravan demandon pri lingvo-nivelo de progresantoj.Li proponis:

1)Dum tendaro doni al paroliga kurso pli multe da lerntempo (mi opinias:5-6,kiel tion faras ĉeĥoj).

2)Organizi apartan tendaron por progresantoj.

Dua propono ŝajnas al mi dume nereala.Pli bone estos plidaŭrigi tempon de E-tendaro ĝis 15 tagoj,kiam progresantoj loĝos kune kun spertuloj.Sed necesus fari jen kiajn ~~xxxxxx~~ organizajn farojn.

1)Ellabori programon por progresantoj(kurso "B"),tion faru fakestro N.L.Januleviĉ.

2)Ĉiu estro de delegitaro donu planon karakterizon de sia ano al tendara instruisto.

3)Al ĉiu"malforta"esperantisto necesus "alkroĉiĝi" spertulon, t.e.patronon,kiu ĉie akompanus kaj paroligus lin(ŝin).Crete tio devus esti farota libervole laŭ konsento ~~x~~ de ili ambaŭ.

4)En ĉambroj ne loĝu samnaciuloj por eviti "krokodiladon"(en mia najbara ĉambro loĝis latvo,ukraino,litovo kaj kazaĥo;mi neniam aŭdis tie eĉ unu rusan vorton).
5)Same apud manĝotabloj sidu diversnaciuloj por paroli nur esperantlingve.
6)Necesus havi radioinstaladon de tendaro kaj trifoje dum tago disaŭdigi interesan,saĝan programon.Organizindas ankaŭ kolektiva aŭskultado:pri politiko,novaĵoj de scienco kaj tekniko,"vivanta gazeto"ktp.
Generale,E-kurso 3-4-monata ne sufiĉas por bone prepari homon al tendaro.E-kurso por komencantoj devus daŭri 7-8 monatojn.
La plej gravaj taskoj niaj estas du:
1)Krei konversacian lernolibron por progresantoj;
2)Eldoni ĉiumonatan lingvo-literaturan revuon,kiu samtempe servus kiel krestomatio por legado.Tie juna esperantisto povu trovi versaĵojn,kantojn,noveletojn,anekdotojn,aforismojn,proverbojn,enigmojn,frazeologismojn,sinonimojn ktp.La revueto povus esti aldono al "Akordo" aŭ kontraŭe.Ĝi multe helpus al progresantoj.

A.Rogov.

Kara redakcio!
Mi bonorde ricevis "Aktuale"-3 kaj avide "formanĝis"ĝin plene.
Vere tre aktuala kaj ĝustatempa estas informo de Arloviĉ pri partopreno de esperantistoj en la Moskva Kongreso de Pacamaj Fortoj.Ĝi donas novan puŝon antaŭen sur kampo de nia agado.Nepre necesas alvoki ĉiujn E-grupojn al tiu agado,ĉar ĝi povas multe influi al oficialiĝo de E-kluboj.
Kompreneble nemezureble grava estas iniciato de nia E-Universitato.Niaj enlandaj E-fortoj estas jam sufiĉe maturaj por tiu celo kaj necesas nur ĝuste koordini tiujn ĉi fortojn.
Ege gravas ankaŭ probleme de progresantoj.Ankaŭ tion ni spertis en nia E-klubo.Ĉar mi rimarkis ankaŭ tion:kiam ni pli da atento turnis al progresantoj,tiam esperantistoj plendis al tio,ke ili enuas en la klubo kaj ne estas interese al ili vizitadi ĝin.
Kaj povas esti,ke la propono de A.Gonĉarov fari apartajn grupojn(aŭ eble nur programojn)por progresantoj servos kiel solvo de la problemo.Tamen mi opinias,ke organizi apartajn tendarojn por progresantoj ne indas,ĉar ni ne devas dispecigi niajn fortojn.Ja tutegale al tiuj ĉi tendaroj por progresantoj estas nepre bezonate altiri bonajn esperantistojn kiuj eble havos problemon:ĉu partopreni E-tendaron aŭ eble utiligi sian sperton en "progresemula"tendaro.Kial do ne fari komunan tendaron kun speciala bona kaj pli vasta programo por progresantoj.Ja ĉiu progresanto post tiuj dek tagoj inter veraj esperantistoj nepre ekparolos se li nur volos tion,kaj se oni dediĉu al li iom pli da atento,ol ni kutime faras.Ja mi povas diri pri mi mem.
Kiam mi finis E-kurson,mi(kiel ankaŭ multaj aliaj esperantistoj) deziris veturi eksterlanden.Sed feliĉe(mi nepre akcentas ĉi vorton) la preparo de miaj dokumentoj jam tiom prokrastis,ke mi ne kredis je la sukceso de eksterlanda veturo.Kion do fari?Mi decidis partopreni almenaŭ SEJT-VII por ne perdi la someran ferion.Kaj mi flugis al SEJT-VII,partoprenis ĝin kaj rimarkis ke nur tie mi ekparolis Esperanton.La tendaro tiom impresis min,ke mi ĝis nun retenas en mia memoro ĉiujn programerojn de la tendaro.
Nur dank'al ĝi mi ekparolis,ĉar antaŭe oni ne praktikis paroli Esperante en nia klubo.Kaj nur reveninte hejmen mi postulis de niaj klubanoj ke ni neprege penu Esperante en klubo kaj ĝenerale ĉiam,kiam renkontiĝas du esperantistoj.Ne gravas ĉu tio okazas sur strato,en aŭtobuso aŭ kie ajn.

Do mi substrekas,ke mi ekparolis nur dank'al mia kontakto ĉiutaga kaj ĉiuhora kun spertaj esperantistoj.Pro tio ni ne devas disigi komencantojn(progresantojn)de spertaj esperantistoj kiuj estos por ili interesaj aktivaj gvidantoj,tiuj, kiuj donos al ili unuan praktikon,ĝustatempe korektos kaj klarigos ĉion nekomprenitan.

Jen ekzemple kiel diras soĉianino Irina Valina post partopreno de SEJT-XV.Neniam mi povis imagi kiel interese estas en E-tendaro.Tie mi konatiĝis kun multaj bonegaj esperantistoj kaj estas ravita de ili.Ho,ege mi volas paroli same kiel Dina Lukjanec,Anatolo Gonĉarov,Viktoro Aroloviĉ kaj multaj aliajX.Post la tendaro mi ekdeziris ĉiujn miajn fortojn dediĉi al Esperanto por almenaŭ iom simili al ili.

Kaj ĉu vi volas ŝirmi progresantojn de niaj modeloj de perfekta Esperanto?Tutcerte ne!Ni devas nepre pli atente rilati al progresantoj ĉar nur el ili ni povas ĉerpi novajn fortojn por plua agado.Kaj mi opinias ke slogano de niaj estontaj SEJT-anoj devas simili al tiuj:Esperantisto,ĉu vi helpis al progresanto?" aŭ:"Esperantisto,transdonu viajn sciojn al progresanto"

Jen kiaj pensoj devigis min preni la plumon.

V.I.Bespalov(Soĉi).

Sub la titolo "Esperanto"-7...

(Rim.de red.:ĉi artikolo estis verkita proksimume antaŭ 1 jaro. Ĝustatempe taŝkenta redakcio de "Akordo"ne sukcesis ĝin aperigi. Malgraŭ malfruo,la artikolo estas sufiĉe aktuala.La artikolo estas kelke mallongigita).

Multon da babilbataloj alportis en la ĉi-someran SEJT-on la problemo de SKT.Ni volas iom prilumi tiun batalon por informi SEJM-anojn,kiuj ne partoprenis tendaron kaj por refreŝigi tiun eventon en memoro de partoprenintoj.

Kiel dum ĉiu batalo tiam klare sin markis la dekstraj,la mezo kaj la leftaj.La unuaj elpaŝis kontraŭ la konstrutaĉmentoj ĝenerale - kiel senutilaj krokodilejoj.Leftuloj oponis,ke SKT estas pli grava eĉ ol SEJT kaj nepre devas esti organizota ĉiujare.Meza proponis:se ni ne povas prepari konstrutaĉmenton dum jaro,provu ni fari tion dum du jaroj,do organizu sekvan SKT-on en 1974-a...Do,fine - dekstrulojn oni ne subtenis,mezulojn kvietiĝis kaj decidis organizi studentan konstruan taĉmenton "Esperanto"-73 en Uzbekio.Tio estis sola konkreta decido,aperinta el tuta babilado.Alia konkreta decido estis ellaborita dum kunveno de SKT-anoj estintaj kaj estontaj: enkonduki en SKT-4 feran disciplinon;por taĉmentanoj jam ne povu forveturi antaŭ fino de labortempo al SEJT,Konferenco,ktp. Ciuj ceteraj decidoj aŭ nenion signifis("Plialtigi respondecon de kluboj pri lingvonivelo de siaj reprezentantoj"),aŭ estis eĉ ridindaj(Demando:"Ĉu devas esti en taĉmento almenaŭ unu komitatano?"Decido:"Laŭ eble"o").Ĉi decidojn ni ankoraŭ tuŝos sube.

Tamen,kio ĉefe mirigas kaj maltrankviligas el la rezultoj de pritaĉmentaj diskutoj?La ekdirita kaj eble eĉ subtenita opinio pri pli grava rolo de SKT ol junulara esperanto tendaro. Ĉefa motivo por la opinio - utilo praktika de SEJM,kiun,onidire,pruvas konstruaj taĉmentoj.Ĉu vere tiel estas?

Ni decidis kompari laboron de SKT "Esperanto-72" kun laboro de iu-ajn simpla studenta konstrutaĉmento.Por komparo ni prenis konstruajn kaj sociajn labor-atingojn de la Konstrutaĉmento "Esperanto-72",laborinta ĉi-jare en Omsko,kaj la konstru-

taĉmento "Antares" - unu el multego da SKT-oj de Tula Politeknika Instituto.La dua estas tute ne la plej bona en TPI sed ankaŭ ne la plej aĉa.Rigardu aldonatan tabelon.

Supozu ni egelan kvanton da prelegoj kaj koncertoj en ambaŭ taĉmentoj(des pli,ke koncerta brigado de SKT "Esperanto-72" gajnis unuan lokon inter ĉiuj similaj brigadoj de Omsko).Tamen klare videblas,ke ordinara studenta konstrutaĉmento "Antares" materialigis multoble pli grandan sumon,organizis bonan sportan,laboron kaj allogis bonsentojn de lokuloj per ĉiutagaj komplezoj - do faris nekompareble pli multe ol unika esperantista SKT.Sed por vere pruvi utilon de SEJ-Movado niaj konstrutaĉmentoj devas esti modelaj.Reala stato eĉ ximikax ne similas al modeleco.

Esperantista konstrutaĉmento krom komunaj taskoj se SKT havas du superfluajn:1)eduki esperantistojn interne kaj 2)propogandi Esperanton ekstere.Estas priplorinda plenumado de tiujĉi taskoj en ĝisnunaj SKT-oj.La unua estis tute forgesita - eĉ tiom spertaj esperantistoj kiel Dima Cibulevskij el Harkovo preferis paroli ruse.Koncerne la duan - estis unu ( ! ) prelego por lokaj loĝantoj pri Esperanto,kaj ĉu multaj krom taĉmentanoj mem vidis la internajn ekspoziciojn kaj murgazetojn?Do en Esperanto - parto de laboro ni ne povas kompari SKT-on eĉ kun bona regiona renkontiĝo,kiu estas pli bona edukejo por komencantoj ol estintaj konstrutaĉmentoj.

Nu kaj post ĉiuj riproĉoj,skribitaj supre,eble neatendita por vi estos nia x opinio:SKT estas entrepreno sendube bezonata kaj utila.Utila laŭ esenco sia,laŭ mem ideo de sia organizo.Bezonata,kiel sola entrepreno,kie esperantistoj unuiĝas kaj amikiĝas per laboro.Sed por esperantistaj studentaj konstrutaĉmentoj absolvu sian ekzistadon necesas tuja kaj efika enmiksiĝo de SEJM-aktivuloj en preparan kaj organizan laboron.Ni volas doni nur kelkajn proponojn pri nepre farendaj aĵoj kaj alvoki la interesantojn al vasta diskutado.Eble ĝi alportos bonajn ideojn.Do:

1)Ceesto en SKT de unu SEJM-xxxkomitatano devas esti nepra.Tion eblas solvi jene.Ĉiujare dum Konferenco estu elektata komitatano,speciale respondeca pri SKT.Nome li estu ankaŭ komisaro de la estonta taĉmento.Tiamaniere la komisaro estos dum tuta jaro ligita kun aliaj komitatanoj per cirkuleraj leteroj kaj pli respondece organizados laboron en SKT,havante tiun ligon kaj bonajn operativajn konsilojn de SEJM-Komitato.Eble en proksima estonto SEJM organizos ne unu,sed du aŭ pli da konstrutaĉmentojn.(Ĉebaltio jam pretas al organizo de aparta SKT,povus ankaŭ UEJM).Tiam nova paperujo de la Komitato estos eĉ neevitebla.

2)Ŝajnas,ke sola komisaro(estu li eĉ la plej aktiva esperantisto)ne sukcesos krei vere bonan lingvodisciplinon kaj Esperanto-laboron.Do unue - ni subtenas tezon,ke komandanto de SKT devas esti nepre esperantisto.Eble flanka sedxfxxxx sperta homo povas organizi konstruan laboron sur deca nivelo,sed pro lia "flankeco" suferos Esperanto-laboro kaj li ne akiros aŭtoritaton de taĉmentanoj,donante samtempe al neesperantistoj bonan kaŭzon porx kontraŭpropagando.Due,kluboj ne povas sendi en la taĉmenton nur aktivajn esperantistojn,ĉar ankaŭ komencantoj devas esti edukataj ie dum somero.Do komencantoj trafos taĉmenton nepre,akceptu aŭ ne akceptu ni decidon pri kluba respondeco.Danĝero aperos de alia flanko.Por sekva somero SEJM planis multajn gravajn entreprenojn - Konferencon,SEJT-on,pedagogian seminarion.Aktivuloj strebos trafi ĝuste tien,do denove povas okazi(kaj eĉ nepre okazos)ke en la taĉmento bonaj esperantistoj denove preskaŭ forestos.Sed la taĉmento devas havi kernon da spertaj esperantistoj.Se tiu kerno forestos - - forestos ankaŭ Esperanto en SKT(krom titolo).Ni pensas ke

rajtas jam komisii al kelkaj E-aktivuloj el studenta medio partoprenon ĝuste en konstrua taĉmento.Por la komuna afero ilia ĉeesto tie estos pli utila ol en la Konferenco.
3)Kiel escepto(se organizontoj ne trovos pli bonan solvon) en taĉmento povas esti unu persono neparolanta esperante - la konstrumajstro.De tiu homo dependas laborprocedo kaj ĝia rezulto,salajro de la taĉmentanoj.Do li devas esti vera majstro - scii bone konstrulaboron kaj ne malpli bone - la sistemon de ordondokumentojn kaj diversajn trarampejojn en ĝi.Se tia homo forestas inter ni - pli bone estas inviti fakulon-neesperantiston ol oficigi nespertan samideanon.
4)Severa disciplino estas unu el ĉefaj kondiĉoj de la sukceso.Se decido pri ĝi koncernos nur tempon de forveturo do tio ne sufiĉos.Taĉmenta estraro devas ankaŭ limigi la kvanton de vesperoj ĉe lignofajro kaj similaj entreprenoj kaj ĝenerale escepte la antaŭripozajn tagojn enkonduki severe precizan tempon de enlitiĝo.SKT ne estas ripozejo kaj por sukcesa laboro homo bezonas post 10-hora labortago almenaŭ 7-horan dormon.
5)Kaj lasta.Ciam organizantoj de SKT suferas pro manko de preciza listo de la partoprenantoj.Do eble jam dum vintroferia kunflugo de reprezentantoj de ĉiu regiono prezentu garantiatan nombron de taĉmentanoj,kaj eble eĉ liston kun indiko nepra de konstruaj profesioj.La komuna listo,kiun ekhavos rezulte la organizantoj,helpos paroli kun lokaj organizaĵij kaj trabati bonan objekton.

Cu iĝos konstrutaĉmentoj "Esperanto"utilaj por nia ŝtato kaj por nia movado,aŭ daŭros ili la povron de preskaŭ senutila "krokodilejo" - dependas de SEJM-anoj mem.Kaj ni certe esperas ke sekvaj konstrutaĉmentoj estos modelaj en laboro por ĉiuj lokaj SKT-oj,kaj ke Esperanto konfirmos sin ne nur en titolo de la taĉmentoj.

M.Bronŝtejn
(Tiĥvin),inĝeniero
V.Sporiŝin(Tula),studento,ano
de SKT "Esperanto-72".

Soĉi.La 16-an de decembro en kulturdomo "Taksomotoro"(sidejo de soĉia E-klubo)okazis kunveno dediĉita al tago de Zamenhof.Okazis diskuto "Kion vi scias pri Zamenhof kaj lia verko",poste estis prezentita koncerto de E-kantoj kaj versoj.Kiel tria programero estis elekto de nova estraro de la klubo.La nova estraro promesis labori aktive kaj akorde.
Dum novembraj festoj nian urbon vizitis 23 kutaisaj pioniroj-esperantistoj kun sia gvidanto K.S.Kaĝaja.Ili venis por preni fruktojn de grefto sur Arbo de Amikeco,farita antaŭ kvin jaroj de kartvela knabino.Apud la Arbo de Amikeco estis ceremonio de fruktenmaniĝo,kaj oni denove greftis burĝonon sur la Arbon de Amikeco.Tio estas jam kvina esperantista grefto sur tiu ĉi mirinda arbo.
Leningrad. En Leningrad en palaco de Kulturo n.de Kirov finiĝis en januaro kurso de E-gramatiko.Ĝin finis 15 novaj esperantistoj.
Barnaul.Atenton!Karaj geamikoj!Dank'al penoj de Barnaula E-klubo en la urbo estas eldonita kolora E-afiŝo,kiu estos dissendita al la SEJM-kluboj.Pro neatenta kontrolo la tekston de la afiŝo enpenetris du domaĝaj eraroj:en vortoj "vi ekaŭdos"kaj "vi ekvidos" anstataŭ "e" devas esti "i".Ni insiste petas,ne uzu la afiŝon en publikaj celoj aŭ por montri al oficialaj instancoj antaŭ ol vi forigos la erarojn,detondos la malsupran tekston aŭ surgluos ian alian.

Barnaula Esperanto-klubo.

Tabelo (Bronŝtejn, Sporyŝin)

| Donitaĵoj por la taĉmento | Konstrutaĉmento | |
|---|---|---|
| | "Esperanto-72" | "Antares" |
| Kvanto de partoprenantoj | 48 | 35 |
| el ili virinoj | pli ol duono | |
| kun konstruprofesioj | | 3 |
| Materialigita sumo (mil rubloj) | ĉ.12 | 15 |
| Socia laboro: | ĉ.20 | 140 |
| koncertoj por lokanoj | 9 | 10 |
| sportkonkuroj | 0 | 10 |
| aliaj entreprenoj | 10 internaj ekspoziĉioj (por taĉmentanoj) | Ateljero "Ŝankon" por lokanoj |

Materialojn por 2 "Aktuale" sendu à 656099, Barnaul-99, ab.jaŝ. II, Esperanto-klub

Redaktis Ju. Vladimireev

tajpis N. Stolbun